


KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Sadretdinova
Naila,
[Voroneĵ, Rusio]

Reveno el ferioj

2003

Kiel Etsuo Miyoshi, japana E-mecenato iĝis esperantisto — la tria periodo de E-literaturo — verkoj de niaj legantoj — neelpensitaj historioj gramatiko serioze kaj amuze — omaĝe al Bill Thorne — aforismoj anekdotoj — diversaj ondoj el bunta mondo — invitoj kaj informoj korespondu!

4

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvořáka 1, CZ-696 62 Stržnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuressaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugalia Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckeavagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

Finiĝis somero, plej ŝatata ripoztempo por multaj. Ni esperas, ke ĝi estis plena de memorindaj eventoj kaj bonaj impresoj por ĉiuj. Redakcio dankas legantojn, kiuj sendis al ni siajn verkojn kaj bildojn, respegulantajn tiujn impresojn.

En tiu ĉi numero vi trovos interesan historion pri esperantistiĝo de Etsuo Miyoshi, Prezidanto de "Swany Korporacio" el Japanio, konata E-mecenato. Rubriko "Esperanto kaj literaturo" ĉi-foje prezentas faman vortariston, redaktoron de Plena Ilustrita Vortaro, francan verkiston Gaston Waringhien. Vin atendas ankaŭ renkontiĝoj kun verkoj de kelkaj novaj aŭtoroj: R.F.Gonzales el Meksikio, S.Ĉikaĉev el Rusio, Tahira Masako el Japanio, S.Vajnblat el Ukrainio kaj interesaj kontribuoj de la aŭtoroj jam konataj.

El Anglio venis al ni ege malĝoja informo pri forpaso de nia kara malnova amiko Bill Thorne, kies kontribuajtoj ĉeestis en preskaŭ ĉiu numero de "Komencanto". Pri li mem kaj liaj verkoj vi legu en ĉi-revuo.

Karaj legantoj, restu kun ni kaj nepre sendu viajn literaturajn provojn!

Agrablan legadon!

KOMENCANTO

2003 numero 4 // (42) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

retpaĝo: <http://Esperanto.net/Komencanto>

abontarifo por 2004:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo - nepre menci **KOMENCANTO**'n,
la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Karaj legantoj! Vojoj, kiuj alvenigas homojn al Esperanto tre varias. Jen ankoraŭ unu historio el vivo kaj interesa rakonto pri esperantistiĝo de Esperanto-mecenato el Japanio Etsuo Miyoshi

Per aktiveco Ĉielen, arda pri idealoj



Kiam mi estis en la altlernejo, mi ekŝatis iun knabinon, sed, ho ve, ŝi ne daŭris reciproki. Mi perdis esperon kaj havante nenian celon, eĉ konsideris morti.

Estis fridventa frumateno, kiam mi skotere forlasis mian hejmon en Ŝirotori, sur la japana insulo Ŝikoku. Mi ne rimarkis kien mi iris, sed mia stirilo nature direktis min al Tokio, kie loĝis mia pli aĝa frato. Eltenante glacian malvarmon kaj ĝisostan lacon, mi finfine post 20 horoj atingis Tokion. Trovinte lian domon mi tutan horon ĝemploradis. Estis la unua fojo, ke mi montris larmojn al iu. Pro mia preskaŭa sinmortigo miaj gepatroj tuj kunvenis al mi kaj rekomendis asketadi ĉe la sanktejo de Oomoto. Tial mi iris al la urbo Kameoka, kie troviĝas la sankta tereno de Oomoto. Tie oni prizorgis min dum 40 tagoj. Min forte impresis speciale la verkoj de majstro DEGUĈI Hidemaru, la edzo de la tria spirita gvidantino. La tekstoj de la Majstro, ekz. "ĉiu kiu naskiĝas ĉi monde havas sian propran gravan sorton" ktp, nature vokis larmojn. Kia mirinda afero, ke la Ĉielo donis indan mision vivi ankaŭ por mi. Kun freŝa vivkuraĝo mi ree povis energie labori.

Kvin jarojn antaŭ tiu aventuro mi finis mian altlernejon kaj eniris labori la kompanion de mia patro, "Miyoshi Fibro Industrio", originalo de *Swamy*. Mi heredis la okupon de mia patro. Ni fabrikis vintrajn kaj skiajn gantojn. Pro tio ni vendis gantojn produktitajn de printempo ĝis aŭtuno, do mankis laboro post novjaro. Ni diris al la dungitoj "bonvolu reveni aprile" kaj maldungis ilin. Estis malagrabla situacio; ĉiuj vivis per senlabora asekuro kaj preskaŭ ĉiuj revenis aprile.

En Oomoto mi inspiriĝis "fari el mia patra kompanio elstaran entreprenon", kaj tiu situacio min turmentis dum kelkaj monatoj. Kiam mi proponis al mia patro: "ni volas komerci en pli malvarmaj landoj, ol Japanio, kiel Usono kaj Eŭropo", li respondis: "viaj kruroj malfortas kaj vi tute ne scipovas la anglan, ĉu tio eblas?". Decidiĝis tamen, ke "nu, ĉiuokaze mi provos".

Kiam la Olimpikaj Ludoj de 1964 okazis en Tokio, tiam mi flugis al Usono. Post 20 horoj mi atingis New Yorko-n. La sekvan matenon mi eliris por matenmanĝi, sed ne povis mendi angle. Mi

promenis ĉirkaŭ la hotelo kaj aŭdace malfermis la pordon de restoracio. Mi vigle mendis "hotto-miruku, too-suto, furaido-eggu, remontii", sed la kelnerino ne komprenis mian anglan. Mi malespere ripetadis, sed sen ia sukceso. Min helpis la japana studento, okazinta en la restoracio. Li prononcis "hot milk" kaj diris "tea with lemon" anstataŭ "remontii". Japanoj lernas "japana-anglan" do, mi tute ne povis elbuŝigi veran anglan, kaj abunde ŝvitis tutkorpe.

En tiaj cirkonstancoj, iel trovinte interpretiston mi vizitis plurajn kompaniojn, sed preskaŭ neniu akceptis min. Koliziinte kontraŭ la kolosa muro de la angla, kaj senespera baraktado, mi ne plu havis memfidon iri al Eŭropo, sed se mi rekte reirus hejmen, mi estus priridata de la najbaroj. Tial mi timforjete flugis per *Pan America* al Germanio. Tamen mi maltrankviliĝis, ĉu la aviadilo vere iros al Germanio? Mi serĉis iun japanon tra la aviadilo, sed enestis eĉ ne unu. Kun tia maltrankvilo veninte en Germanion mi dungis interpretiston kaj serĉis ganto-importajn entreprenojn tie.

Unu semajnon poste, mi flugis al Italio. Tie mi ne povis kompreni eĉ kalkulon, do mi nur ofertis al taksiaj ŝoforoj manplenon da mono, dirante konfide "bonvolu". En restoracioj mi neniam antaŭkonis, kia manĝaĵo aperos. Tiamaniere dum unu monato mi ĉirkaŭvojaĝis la mondon. Surterinte en Tokio mi malsupreniris la ŝtuparon, sed mi sentis, ke miaj piedoj ne tuŝis la teron, mi sentis en mi kvazaŭ somnambulismen. Ege zorgante mi eĉ konsultis kuraciston, sed li trovis nenion malbonan. Tia malsano tuj kuraciĝis, sed mi diru ke lingvojn, horzonojn, manĝojn, valutojn ks mi ne eltenis. Ŝokiĝi pro fremdaj kulturoj estis eksterordinara sperto.

La sperto de mia mondvojaĝo estis sekva: se oni ne komprenas la anglan, oni ne sukcesos. Tuj mi eklernis la anglan per NHK-radio, kaj senferie persistadis dum 3 - 4 jaroj. Mi instalas sonbendon, kun la prelego de J.F.Kennedy, en mian aŭton, kaj mi laŭtvoĉe kunparolis. Tiel mi ekzercis, tute dulingve, dum miaj komercaj vojaĝoj. Ĉar mi ĝenerale ĉ. 10.000 kilometrojn jare ŝoforas, do, mi 700 fojojn elparolis tiun 1-horan prelegon. Krom tiu konversacio de la angla ĉe NHK, mi studadis ĉe la Lernejo Berlitz en Kobe dum 1 monato. Mi lertiĝis en la angla per radio kaj babilante enaŭte.

La jaron post mia globrondiro, kiam mi penadis lerni la anglan, mi legis la libron, "Vojaĝoj en Esperantujo" de gvidanto DEGUĈI Kyotaro. Per ĝi mi eksciis pri la ekzisto de reva mondo. Gvidanto Kyotaro partoprenis en la E-a oratora konkurso en Sofia kaj gajnis la duan premion. Kun granda emocio mi legis kaj pensis ke ankaŭ mi ... sed pro tio, ke tiutempe antaŭ ĉio mi devis mastri la anglan, mi firme decidis ke "iam mi nepre lernu E-on".

Ĉiujare 3 foje ĉirkaŭirante la terglobon, per daŭra fortostreĉo mi dum 10 jaroj pionire ekebligis komercadon, kun preskaŭ 100 kompanioj. En la 60-aj jaroj estis eksportitaj al Eŭropo kaj Usono gantoj de 4 niaj fabrikoj en Japanio. Sed okazis ke la aĉetantoj ĉesis veni al Ja-

Per aktiveco Ĉielen, arda pri idealoj
daŭrigo de la paĝo 3

panio, kaj preferis aĉeti de Koreio kaj Tajvano. La jaraj mendoj malmultiĝis je 30%. Do mi kun la patro iris al Tajvano kaj Koreio por esplori la situacion. Ni pensis, ke Koreio pli taŭgas, ol Tajvano do en 1972 nia fabriko translokiĝis tien.

100 fojojn irante al Koreio, mi surtrakis produktadon, kaj konstruis sistemon de eksporto al Japanio, Usono kaj Eŭropo, sed ne konante la korean lingvon, mi ne povis sufiĉe interparoli kun la dungitoj. Do mi invitis korean instruiston de Berlitz, kaj dum 5 monatoj senmanke mi nur laboris matene, kaj post tagmeze 10 horojn intense studadis. La individuaj lecionoj ne lasis eĉ unu sekundon da paŭzo, ja estis kvazaŭ torturo, kaj 4,000 vortoj estis enmartelitaj en mian kapon. La korea lingvo havas sonojn "te, ni, o, ha" kaj por Japanoj ĝi estas la plej facila. Vidante la japanan mi povis paroli la korean, sed mankis tempo por tuŝi Esperanton.

En Koreio laboris 1.200 homoj en 3 *Swany* fabrikoj, sed en la 80-aj jaroj ankaŭ tie ĉesis veni la klientoj, kiuj nun iris al Ŝanhajo. Ĉar, tiutempe monata salajro en Ĉinio estis ĉ. \$70 kaj en Koreio \$350.

Pro tiuj malsamaj kostoj pli kaj pli altiĝis la debeto de la koreaj fabrikoj, kiu gvidus nur al bankroto. En la 80-aj jaroj ni estis devigataj fermi unu post la alia, la koreajn fabrikojn kaj, ni ekkomencis en Ĉinio, kio eĉ por grandaj entreprenoj laŭdire estis malfacila afero.

Dum la duonjaro, ĝis la fino de la komuna kontrakto inter la Ĉinia registaro kaj *Swany*, mi vizitis Ĉinion sesfoje, kaj necesis 42 tagoj da intensaj penigaj negocioj por krei novan kontrakton. La tago kiam ni subskribis tiun kontrakton, la 4-an de majo 1984, venis telefonvoko de la Oomoto Centro, al mia edzino. Majstro Hidemaru ĵus kaligrafiis "La granda irado inter Sanuki (historia nomo de mia gubernio) kaj Ĉinio". Rezulte de diversaj informiĝoj ili juĝis, ke tio temas pri s-ro Miyoshi.

Se oni ĉiumonate vizitas Ŝanhajon, estas facile scipovi tiun lingvon. Sed min ravis Esperanto kaj post longa ĉagreniĝo, mi decidis eklerni ne la ĉinan sed Esperanton. Tio okazis antaŭ 8 jaroj, 30 jaroj post legi "Vojaĝoj en Esperantujo".

Etsuo Miyoshi, Prezidanto de "Swany Korporacio", Japanio

La tria periodo de esperanta literaturo

Karaj legantoj! Ĉi-foje en la literatur-historia rubriko ni volonte prezentas francan verkiston Gaston Waringhien, kiu eniris en la historion de Esperanto kiel eminenta vortaristo. Liaj meritoj sur vortara kaj gramatika kampoj de Esperanto estas nemezureblaj, ĉar li faris ĉi tie gigantan laboron. Sed G. Waringhien estis ankaŭ poeto, tradukisto, eseisto kaj lia literatura verkado apartenas plie al la tria literatura periodo.

Gaston Waringhien naskiĝis 29 jul. 1901 en franca urbo Lille. Li estis licea profesoro, literatura recenzisto de Lilla radio. Li ankaŭ multflanke agadis por Esperanto: gvidis kursojn, estis kunlaboranto de revuo "Literatura mondo" kaj redaktoro de "Nica Literatura revuo", en kiuj li aperigis krom recenzoj kaj literaturaj studoj poemojn originalajn kaj tradukitajn el Baudelaire, Hugo, Verlaine, Mallarmé, ktp. Liaj tradukoj montras artan lingvon, grandan enhavan fidelecon, perfektan transdonon de sento kaj penso. Li aktive interesiĝis kaj okupiĝis pri poeziaj demandoj, la rezultojn de siaj studoj li resumis en "Skizo de Esperanta metriko", aperinta en la gvidlibro por poetoj "Parnasa gvidlibro" (1932), kiun li verkis kune kun K. Kalocsay.

Dum jardekoj li estis prezidanto de la Akademio de Esperanto. Granda laboro de G. Waringhien kuŝas en la Plena Vortaro de Esperanto, kiu aperis en 1930. Ĝerminta el ĝi Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estis kulmino de lia leksikologia laboro. PIV aperis kun lia ĉefredaktoreco en tri eldonoj kaj donis seriozan bazon por uzantoj de la lingvo ne nur en la ĉiutago, sed ankaŭ en literatura kreado, tradukarto kaj sur multaj aliaj fakaj terenoj.

Gaston Waringhien kune kun Kalman Kalocsay verkis ankaŭ Plenan Analizan Gramatikon de Esperanto (PAG). Ĉi tiuj du grandiozaj verkoj, PIV kaj PAG, de ilia apero ĝis nun estas la plej necesaj helpiloj por ĉiu esperantisto: ĉu komencanto, ĉu spertulo.

En 1948 estis eldonita sub redakto de Waringhien libro "La leteroj de Zamenhof", kiu, dank'al sukcesa envicigo de la leteroj kaj trafaj redaktoraĵoj, legeblas kvazaŭ drama historio de la homo, kiu tutan sian vivon dediĉis al realigo de grandioza internacia lingva projekto.

En siaj tri eseoj: "Beletro" (1956), "Lingvo kaj vivo" (1959) kaj "Ni kaj ĝi" (1972) Waringhien esploras kaj konigas al la legantoj kiel elformiĝis Esperanto el la praesperantoj, kiel ĝi evoluis, kritikis la "postesperantojn", la diversajn lingvoprojektojn, kiuj naskiĝis ekde Ido. Samtempe li distre, interese kaj kvazaŭ lude instrue pri-traktis multajn diversajn temojn, gramatikajn demandojn, per delikata peniko pentras portreton de esperantistoj.

De 1955 ĝis 1962 regule eldoniĝis "La Nica literatura revuo" sub redaktado de Waringhien, kie li aperigis multajn siajn poemtradukojn el franca kaj angla lingvoj kaj originalajn poemojn sub la kaŝ-nomo G.E.Maŭra. Sub tiu ĉi pseŭdonimo li verkis ankaŭ la poemaron "Duonvoĉe".

El liaj tradukoj estas vaste konataj "Maksimoj Rochefoucauld" (1935), "Poemoj de Omar Kajam" (1953), "Floroj de l' Malbono" de Baudelaire (1957), "Himeroj" de Gérard de Nerval (1976). Kune kun Kalocsay li tradukis poemkolekton de Heine "Kantoj kaj romanoj" (1969).

Multaj poetikaj, tradukaj, eseaj verkoj de Gaston Waringhien riĉigis esperantan literaturon per vera trezoraro, per plezuriga instruo, per kuraĝigaj argumentoj. Kelkajn fragmentojn el liaj verkoj vi povas tralegi ĉi tie.

Gaston Waringhien

fragmento de la eseo

LINGVO KAJ VIVO

Lingvo estas esence socia fenomeno, ĉar ĝia tuta valoro kaj unua funkcio estas ebligi la interŝanĝon de emocioj, de deziroj, de ordonoj, de malpermesoj, de argumentoj. Sed tiu socia fenomeno ekzistas nur kiel prezentata en la konscio de la individuoj; kaj oni scias, ke la lingvistoj kutime distingas eĉ tutan kategorion da lingvaj faktoj, kiuj dependas nur de la individuo: "La stilo estas la homo mem" jam delonge skribis nia Buffon...

... Ke Esperanto estas jam de nun taŭga portilo de la plej altaj kulturaj valoroj, nur la nekompetentuloj povas tion diskuti. Ke ĝi estas neŭtrala interkomprenilo, metante ĉiujn siajn uzantojn sur la sama nivelo kaj en la samaj kondiĉoj, tio estas evidenta al ĉiu, kiu eĉ unu fojon ĉeestis niajn kongresojn. Esperanto ne malaperigas la diskutojn, nek la kaŭzojn por diskuti, sed ĝi donas al ĉiu la konscion, ke li estas egalrajta kun ĉiuj aliaj, ke, parolante Esperante, li faras tiun saman oferon, kiel ĉiuj aliaj, kiuj ankaŭ oferas la uzon de sia nacia lingvo. La alpreno de Esperanto en internaciaj konferencoj, kaj precipe en la politikaj, radikale forigus tiun "komplekson de malsupereco pri la lingvo", kiun sagace analizis antaŭ ne longe la sudamerika Prof. Martel. Kaj tio estas vera, ne nur el la pure praktika vindpunkto (ĉar neniu delegito havus la avantaĝon paroli sian naskiĝan lingvon kaj tiel facile superi en la argumentado tiujn, kiuj devus deprunti fremdan lingvon kaj suferus la bremsadon de la tradukpado), sed precipe el la intelekta kaj kultura vidpunkto, ĉar la memrespekto kaj prava fiero de iu ajn ano de unu lingvo ne estas ofendata per la deviga rezigno pri la uzo de sia hejma lingvo kaj la deviga submetiĝo al alia, alivorte per ia deviga fremdiĝo kaj de la parolo kaj de la pensado.

En tiu senco, sed nur en tiu senco, ni povas diri, kiel Zamenhof proklamis neforgeseble en sia parolado antaŭ la Unua Kongreso, ke Esperanto estas ilo de pacigado de la spiritoj, certigante al ĉiuj homoj la lingvan egalrajtecon.

KVAR IMPRESOJ DE VINTRO

de Georges E. Maŭra - pseŭdonimo de G. Waringhien
(el la Esperanta Antologio)

1.
Blanka prujno, sanga suno
sur la vitroj de l' fenestroj.
Aer', kristala ŝtono!
2.
Ho, la pluvo de l' mateno!
Kiel kapo sur kuseno:
rideto inter larmoj...
3.
Roza lumo el la nuboj,
tag' decembra grize roza —
malfrua am' en vivo.
4.
Koton kaj foliojn pikas
mil mil pingloj delikataj:
maljuna Pluvo trikas.

*

TAGE-NOKTE MI NUR LIRIS

Heinrich Heine. Trad. G. Waringhien

Tage-nokte mi nur liris,
kaj nenion mi akiris.
Naĝis mi en harmonio
kaj alvenis al nenio.

ROBAIOJ

Omar Kajam

el la persa lingvo tradukis Gaston Waringhien

Kajam, se vin l' ebrio de vino vestas — ĝoju!
Se tulipvanga juno ĉe vi siestas — ĝoju!
Ne afliktiĝu, ke vi nenio estos morgaŭ:
supozu vin senesta kaj, ĉar vi estas, — ĝoju!


Jes, estos nigrokulaj hurioj en Ĉielo
kaj vino rozkolora kaj lakto kaj mielo:
jam nun ni do rezignu nek vinon nek amoron,
se eĉ en la altaĵoj atendas nin tielo!

Se tion diri simple, senmetafore, ni
estas ŝakpecoj, kiujn priludas Mond-geni';
kaj ni, post eta rolo sur la tabul' de l' vivo,
revenas unuope en keston de l' Neni'.

La karavan' de l' vivo — kiel sur voj' ĝi pasas!
Ekkaptu la minuton de pura ĝoj': ĝi pasas!
Verŝisto, kial zorgi pri la morgaŭ' de l' gastoj?
Alportu la pokalon, ĉar nokto, oj! ĝi pasas.

Drinku do vinon! Baldaŭ vi dormos ja sen fin'
sen kamarad', sen gasto, amiko aŭ edzin'!
Atentu: al neniu konfidu ĉi sekreton —
velkinte, la tulipo ne plu relevos sin!


Robaio estas specifa formo de persa poemo. Tiu poemformo konsistas el kvar versoj de tre karakteriza ritmo, ankaŭ la rimoj de robaio estas specifaj: unua, dua kaj kvara versoj ĉiam estas kaŭnigitaj per unu rimo, sed la tria regule restas blanka (senrima) aŭ kiel diras la araboj - "kastrita".



Sadretdinova Nalla [Voronej, Rusio]

Cezar [Altenburg, Germanio]

Kun vi ĝis la fino de l' mondo



Ni forpermesis en la ĉeĥa regiono Bohemia Arbaro. Jam matene ni estis aĉetintaj la biletojn por la vespera rondveturo per ŝipo, en la oficejo de la ŝipkompanio "Rosenberger Lipno-Linio K.k.l.r."

Ni estis gaja paro kaj tute certe aspektis kiel ĵus enamiĝintaj. Ni staris ĉe la ŝiphaltejo en "Lipno nad Vltavou" kaj atendis la momenton, kiam ni rajtas eniri en la pasaĝerŝipon, kiu jam laŭlonge alboridiĝis. La aliaj veturgastoj, ofte pli junaj ol ni, alvenantaj iom post iom, certe ne supozis, ke ankaŭ ni bezonis sufiĉe da tempo por kompreni nin tiel bone kiel nun. Ni staris ĉe la kajo kaj ĝuis la freŝan brizon, kiu karesis la lagon. La longe etendiĝintaj montĉenoj, kovritaj de malhelaj arboj, memoriĝis al mi la fjordojn en Norvegio.

Mi ŝercis pro la kompanio kun limigita respondeco: "Kiam ni tuj dronos, kiu tiam pagos la reston al ni?"

"Neniu, karulo, ĉar ni tiukaze mortus!" - respondis seke mia kara, kiu tiumomente ne volis aŭdi ion pri ekonomiaj aferoj.

Kelkajn minutojn antaŭ la deka ni rajtis fine eniri. Mi prenis Donjon ĉe la mano, kaj ŝi sian Cezar. Mia belulino aspektis kvazaŭ ŝi irus al kamavalo. Ŝi vestis sin per blanka pantalonino laŭ Capri kaj per matrosa bluzo kun orkoloraj ankrubutonoj, kies formo certe estis ŝtelita de la Nigra-mara floto. Mi ne devis kaŝi min por honto, ĉar mi surmetis leĝeran novan ĵinzon kaj blankfonan anglalingvan T-ĉemizon de la "Blua Klubo Teamo Por Naŭtikaj Rememoroj", impresantan la rigardantojn per sia blua surprisita trimasta velŝipo.

Nun ni paŝas trans la helpoponteton kaj ĉe la ferdeka enirejo salutas nin la afabla kapitano. La ferdeko de la motorizita malgranda blanka ŝipo "Lipno" havas grandajn tabulecajn fenestrojn ĉirkaŭe. En la malantaŭa parto de la ŝipo troviĝas la restoracia salono kun meza trairejo. Antaŭe supreniĝas malvasta komandoponto, kiu leviĝas iom oblikve en la ĉielon. Ni "stiras triborden" en la direkto al la pruo kaj tuj mendas ĉe la bufedo du glasojn de la seka ruĝvino "Frankovka", kiun ni jam ofte gustumis en tiu forpermeso. Ni sidiĝas, lante trinkas kaj ĉirkaŭrigardas. Estas tre agrable, tiel malstreĉe kaj leĝere flosi sur la akvo!

Baldaŭ ni estas en Frymburk. Tie eniras virino kun knabo. Kiam ili sidiĝis, la vespera krepusko subite fantome komenciĝas. Ĉar ni partoprenas unuafoje vesperan veturon, ni ambaŭ estas surprizitaj. Kia magia lumo regas ĉirkaŭ nia ŝipo! Ni ĉiuj tute silentiĝas. Ankaŭ la geavoj el Vieno kun la dorlotita nepo, sidantaj kontraŭ ni, finas sian superecan mokadon pri la servutemaj ĉeĥoj, ĉar ekstere preterflugadas nin impresaj naturspektaklaj bildoj.

Mi ne volas foti tra la vitrotabuloj, kaj tial ni iras al la poba parto de la ŝipo, kie du ĉeĥoj ĵus komencis ludi per akordeono kaj frapinstrumentilo, kiu konsistas nur el basa tamburego, tambureto kaj surstangigita cimbalparo. Tra la fenestro malantaŭ la muzikistoj mi facile povas ngardi ekstere kaj foti.

La ŝipo brilas treme, kvazaŭ oni vualis ĝin en orfion. La bordo aspektas tiel nenature kiel la pentraĵoj en moma artgalerio. El helaj truetoj en pezaj malhelaj nuboj lumas oraj sunradioj sur la krispan akvosurfacon. Sub restaĵoj de iama blua ĉielo tre alte amasiĝis kumuluso. Noktonigraj montoĉenoj, aspektantaj kiel siluetaj eltondaĵoj, moviĝas preter nin en longaj ondoformaj linioj, kvazaŭ tirataj de iu sekreta mekanismo. Eĉ la postpobaj ondoj ŝajne estas akvareloj, kiujn artisto kun fluantaj penikstnojn svinge kaj softe pentras en la akvon. La muzikistoj de la ferdeka orkestro estas perfekta kaj harmonia duopo. La pli olda viro, la ĉeĥo, ne povas nei, ke li jam ludis, kiam ankoraŭ ekzistis la Danubomonarkio. Lia ekzakta ritma frapado sonas iom tro militece, sed tamen iel nostalgie. Ili ludas tion, kion oni certe jam aŭskultis en la unua ĉeĥa respubliko: polkonoj, ĉeĥajn popol-kantojn, kompreneble la Radetzky-marŝon kaj por ni persone tute surprize la "Bohemia Arbaro-kanton". Ĉar ni vestis nin iom kamavale, ili tuj ekkonis nin kiel germanajn turistojn. Terure, sed kion fari?

Kiam la naturteatro ekstere trovis sian finon, mi sidiĝis al Donjo, kiu jam mendis la duan ruĝvinon por ĉiu el ni. Ni babilas pri pasintaj ŝipaventuroj, ekzemple pri la veturo sur eleganta historia vaporŝipo de Dresdeno al Rathen, kie ni vidis tiam sub altaj rokoj teatraĵon de Andersen-fabelo: "La soldato kaj la fajrilo". Jes ja, nia filino tiam vidis la prezentadon kun ni. Estis grava familia tago. "De kie devenas nia volupta avido je turistaj pasaĝerŝipoj?", - mi demandas mian matrosinon. Ankaŭ ŝi ne scias tion precize, sed ŝi rememoras pri pliaj veturoj: la tielnomatan buteroveturon ekde Trave-muende sur la Balta Maro, la veturon ekde Lübeck, la rondveturon sur la Sejno preter la katedralo Notre-Dame de Paris. Ni miras, ke ni jam tiel ofte veturis sur iuj ŝipoj.

Je kelkaj minutoj antaŭ nia elŝipiĝo, mi eltiris el la poŝo de mia dorsosako tute forgesitajn, jam frue aĉetitajn poŝtkartojn. El unu el tiuj kartoj rigardas nin fidelmiens, iom skeptika hundo, boksero kun blua kapitana ĉapelo kaj ĉifonita vizaĝo. La buŝegon kaj la antaŭajn piedojn li tenas kiel olda marveterano sur la granda bruna stirrado antaŭ si. Sub la foto troviĝas la teksto: "Za Tebou se vydam aj na konec svjeta!" *Kun vi mi iros ĝis la fino de l' mondo!* Estis komika bildo, ni samtempe laŭte devis ekridi, certe, ĉar ni rekonis nin senkonscie en la fidela hundovizaĝo. Ĉu fidela hundo, ĉu nedisigebla homa geo, Darvino mia, kie estas la diferenco?



Rubén Feldman González [Meksiko, Meksikio]

Mia patrino dolĉe diris al ni

Mia patrino instruis al ni estimi laboron bone faritan:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Se vi mortigos unu la alian, faru tion ekster la domo, mi ĵus finis la dompuradon."

Ŝi instruis religion:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Vi pli bone preĝu ke ĉi tiu makulo estu purigebla el la tapiŝo."

Ŝi igis nin kredi je tempovojaĝoj:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Se vi ne paciĝas, mi piedbatos vin en la mezon de la venonta semajno."

Ŝi instruis logikon:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Ĉar mi diris tion.Tial."

Ŝi instruis antaŭvideblon:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Estu certaj ke vi uzas purajn kalsonojn, ĉar akcidento povas okazi."

Ŝi instruis ironion:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Ridu, ridu plu kaj mi donos ion al vi por plori, kiel ekzemple baton sur la kapon."

Ŝi instruis paradokson:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Fermu la buŝon kaj manĝu la manĝaĵon..."

Ŝi fidigis nin ke ni povis fari ion ajn:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Vidu la malpuron je la dorso de via kolo!"

Ŝi instruis paciencon:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Vi sidu tie ĝis la spinaco malaperos el la telero"...

Ŝi instruis pri la vetero:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Ŝajnas ke tornado kaj trombo balais vian ĉambron"...

Ŝi instruis astronomion:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Se mi krias ĉar mi vidas meteoron falante sur vian kapon, ĉu vi aŭskultos min tiam?"

Ŝi instruis hipokritecon:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Mi diris al vi cent milionoj da fojoj: ne troigu!"

Ŝi instruis bonan konduton:
Ŝi dolĉe diris al ni: "Ne agu kiel via patro..."

Ŝi instruis pri la ciklo de vivo kaj morto:
Ŝi dolĉe diris al ni: " Mi alportis vin al ĉi tiu mondo kaj mi povas resendi vin per kelkaj piedbatoj sur vian pugon."

Vi povas fari absolute nenion...

Mia patrino rakontis historiojn al mi antaŭ ekdormiĝo:

Kuniklo vidis korvon en la alta pinto de fosto.
— Kion vi faras, s-ro korvo ?
— Mi faras absolute nenion, - diris la korvo.
— Ĉu mi povas fari la samon?
— Jes, certe, s-ro kuniklo !
La kuniklo sidis tie farante nenion.
Lupo venis kaj manĝis la kuniklon.

Moralajo:

Vi povas fari absolute nenion, sed vi devas vivi tre alte.

Nure rakonto

Kia diferenco ekzistas inter virinoj
8 - 18 - 28 - 38 - 48 jaraĝaj?

8 jaraĝa

Vi ŝin portas al lito kaj rakontas al ŝi RAKONTON...

18 jaraĝa

Vi rakontas al ŝi RAKONTON kaj vi iras kune al lito.

28 jaraĝa

Vi iras kune al lito sen bezoni rakonti al ŝi RAKONTON.

38 jaraĝa

Ŝi rakontas al vi RAKONTON kaj vin kondukas al lito.

48 jaraĝa

Vi rakontas al ŝi RAKONTON por eviti iri al lito.



Dalmatova Daŝa [Jelec, Rusio]

Neelpensitaj historioj

Rakontas **Sergej Ĉikaĉev**, esperantisto, kiu vojaĝas petveturante ĉirkaŭ la mondo. Pri lia tutmonda turneo legu ĉe la 15-a paĝo.

Kiel per segilo movi aŭtomobilon.

Foje en Jakutio, mi atendis la samvojan aŭton dum ses diurnoj. Fine venis la granda kamiono, mi haltigis ĝin, la du ŝoforoj kunprenis min kun si. Ni veturis laŭ la sovaĝa vojo inter montetoj. Subite nia aŭto haltis. La motoro ne plu volis starti, ĉar elektra akumulilo ne havis sufiĉan energion. Kion fari?! Ĉirkaŭ ni je centoj da kilometroj estis sovaĝa tereno, oni povis atendi helpon dum pluraj tagoj.

Tiam la ŝoforoj elturniĝis. Ili havis kun si la benzinmotoran segilon. Oni demuntis la segilĉenon, ligis la generatoron de la aŭto kaj la segilon per rimeno, funkciigis la motoron de la segilo kaj dum longa tempo laborigis la generatoron, kiu "plenigis" la akumulilon per rezervo de elektro. Kiam ĝi okazis sufiĉa, la ŝoforoj funkciigis la motoron de la aŭtomobilo. Feliĉaj ni daŭrigis la vojon!

**Mi ne estas ja bankisto,
estas mi pet-veturisto**

En Moskvo loĝas iu bankestro, tre riĉa homo. Lia la plej ŝatata ripozo kaj malstreĉiĝo estas ne luksaj restoracioj aŭ kazino, sed pet-veturado. Post labora semajno li alivestiĝas kvazaŭ ordinara pet-veturanto, ekstaras ĉe ŝose-rando, haltigas la samvojnajn aŭtojn kaj veturas je kelkcentoj da kilometroj for de Moskvo, ĝuante la plenan ŝanĝon de sia vivmaniero. Dimanĉe li revenas, plena de freŝaj impresoj de la konversacioj kun ŝoforoj. Ja ŝoforoj estas grandaj filozofoj! Kaj lunde li denove estras sian bankon impone kaj gravmiene.

Kiom facilaj estas esperantistaj gastoj! el retaj konversacioj pri eksterlandaj gastoj en Japanio

... Iam al Esperanto-Domo en Tokio venis, el fora lando, unu komencanto.

— Kiam vi venis al Japanio? Ĉu vi parolas la anglan? - Li ridetis, parolis nur lingvon de sia nacio. Mistere, kial li venis?!

Iam komencanto venis el alia lando, kaj ĉeestis kunsidon kun komencantoj japanaj. Sed, kiel povas kompreniĝi ambaŭ komencantoj? Por niaj komencantoj necesas ŝanco akcepti alilandajn samideanojn, kiuj bele parolas, ne komencantas.

Por la movado, por niaj komencantoj, ni "semas kaj semas"... Se komencanto el alia lando jam havas same kiel ni La Idealon, kaj esperon posedi la lingvon, mi bonvenigas eĉ se li/ŝi ankoraŭ balbutas.

Osioka Moritaka [Hirosima, Japanio]



... Antaŭ kelkaj jaroj al ni venis iu komencanto pri la japana lingvo, ne pri Esperanto. Ni ne povis kompreni kial ŝi ne manĝis kaj kion ni faru, ĉar ŝi ne povis esprimi sian deziron eĉ pri manĝaĵo. Ŝi estas gastino sendita al ni pere de iu Asocio de Internacia Amikeco. Se ŝi estus komencanto pri Esperanto, mi neniom plendus.

Ankaŭ mi akceptas hejme multajn ne-esperantistajn gastojn tra la urba kaj gubernia internaciaj asocioj. Mi jam havas nenian surprizon pri malfacilaj gastoj.

- Iuj knaboj interesiĝis nur pri televid-ludoj. Mi devis akompani ilin al ludejoj dum plenaj du tagoj.
- Iu volis manĝi nur Teriyaki-kokaĵon.
- Iu islamano manĝis nenion, ĉar estis ramadana sezono.
- Iu interesiĝis nur pri butikumo por aĉeti memoraĵojn. Mi devis akompani lin al 100 vendejoj dum la tuta tago.
- Iuj interesiĝis nur pri diskuto kun lokaj politikistoj. Mi devis inviti mian amikon, urban parlamentanon.

Multaj havis ĝenon interkomuniki kun mi, ĉar mi ne kapablas en aliaj lingvoj escepte de Esperanto.

Kiom facilaj estas esperantistaj gastoj!

Tahira Masako [Kyoto, Japanio]




Natura fenomeno

Karaj, iu el vi, kiel ekzemple mi mem, frontas naturan fenomenon - maljuniĝon.

Kaj, baraktas..

Mi fojfoje volas plendi kontraŭ la Eduka Ministrejo, ke ŝtataj lernejoj ne donis al mi lecionon kiel maljuniĝi, kaj mi baraktas kiel pasigi pli sukcese la kroman vivon.

Osioka Moritaka
[Hirosima, Japanio]



LINGVAJ RESPONDOJ

L. L. Zamenhof

Pri "sidiĝi" kaj "eksidi"

Vi estas prava: anstataŭ "sidiĝu" estus pli bone diri "sidiĝu vin" aŭ "eksidu"; tamen ĉar la formo "sidiĝu" jam de tre longe estas uzata preskaŭ de ĉiuj Esperantistoj, tial ĝi fariĝis jam "esperantismo" kaj nomi ĝin eraro oni jam ne povas. Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto de bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se oni postulos ĉiam nur logikon *absolutan*, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute ne ebla, ĉar tiam malaperos ĉiu utileco de longa ekzercigado kaj en la deka jaro de uzado de la lingvo, kiel en la unua jaro, ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi ĉiun sian vorton. Tamen la diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke, dum en la unua oni devas uzi *mur* tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas *malpermesata*, — en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis, kaj li povas esti konvinkita, ke se lia formo estas efektive bona, ĝi baldaŭ trovos multajn imitantojn kaj iom post iom elpuŝos la malpli logikan, kvankam ĝis nun pli uzatan formon malnovan.

Nominativo post "po"

Inter la esprimoj "doni po 2 pecojn" kaj "doni po 2 pecoj" estas ankoraŭ malfacile diri, kiu estas la pli bona, kaj tial ambaŭ esprimoj estas uzeblaj kaj bonaj. Tamen konsiderante, ke danke la intervenon de la vorto "po" la "pecoj" jam ne dependas rekte de la "doni", ni konsilas uzi post "po" tiel same kiel post "da" la nominativon ("doni po 2 pecoj"). Alia kaŭzo por tiu ĉi konsilo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke laŭ nia opinio "ĉie, kie oni dubas inter la nominativo kaj akuzativo, oni devas uzi la nominativon".

La Esperantisto, 18991, p. 7



Vrotoj knue — Itieroj miskite

Itnesera femoneno

Laŭ rezultoj de epsrolo de unu bitria uinevsitrato, ne garvas, en kiu odro satras Itieroj en la vorto. Garvas, ke la uuna kaj la latsa Itieroj straus sur saĵi lkoj. La ctereaj Itieroj pvoas sevki en penla mlarodo, tetualge la teskto etsas lebegla sen porlemboj. La kŭazo de silima femoneno etsas tio, ke ni ne lgeas la ĉuin Itieron aprate, sed prepectas la tatun vroton keil unoun.

Oni disvastigis tiun tekston en interreto kaj multaj ret-uzantoj konfesis, ke ne tuj rimarkis la literan kaoson. Aperis la angla varianto, poste la rusa. Kaj ĵus vi legis tion en Esperanto.

Kiel do oni povas klarigi la fakton, ke ĉiu homo, kiu scias facile legi en la lingvo, sen problemoj komprenas ĉiun vorton en la teksto, konsistanta, ŝajnas, el litera kaoso?

Kiel komentas fakuloj pri "psikologio de percepto", tiu ĉi efekto baziĝas sur unu el la ecoj de la procedo de vid-percepto — ties tuteco-unueco. Tiu ĉi principo estis malkovrita kaj formulita de la sciencistoj de la skolo ĝestalt-psikologoj (de la germana ĝestalt — strukturo, formo) jam en la komenco de la pasinta 20-a jarcento. En tiu skolo oni resumis rezultojn de eksperimentoj kaj formulis bazajn principojn de la perceptado, laŭ kiuj *la unua unuo* de la

percepto estas ĝuste la vorto, sed ne aparta litero. La senco de vorto konstruiĝas el sumo de ĝiaj partoj, tiel ja funkcias la homa cerbo.

Dum aliaj eksperimentoj oni eĉ pruvis, ke tekston eblas kompreni, se forigi el ĝi ĝis 70% da elementoj!

En nia ekzemplo ĉiuj elementoj ĉeestas, sed la literoj estas metitaj kiel ajn, en la libera senordo. Evidentiĝis, ke plej gravas ĝuste la unua litero, kiu nepre devas stari sur sia loko — ĝi estas *signifa informa signo*, al kiu homo donas la unuan atenton.

Do, ni legis la unuan literon, vidis la lastan kaj poste la cerbo proponas variantojn, kongruajn al la skemo de tiu vorto, kaj leganto elektas la taŭgan laŭ senco, kunteksto kaj multo alia. Ĝuste tiun principon uzas rapide legantaj homoj, tial rapideco de legado ĉe ili estas kelkoble pli alta, ol ĉe ordinara homo.

Tiun praktikon oni instruas ĉe diversaj kursoj de rapidlegado — kapti la signifajn literojn en vortoj kaj tra ili konstrui la vorton kiel la tuton.

Problemoj pri la legado de nia teksto povos aperi eble ĉe la infanoj, kiuj nur lernas legi po-silabe kaj eble ĉe ne tre kleraj homoj.

Estas interese, ke diversaj friponoj sen ajnaj teorioj jam delonge uzas tiun fenomenon. Ekzemple, oni faris nomon de la firmao "Pasanonik" "Hiatchi" ks.

Estas interese, ke inventantoj de "Pasanonic" estis loĝantoj de Sud-Orienta Azio, kie oni uzas hieroglifojn kaj nature pli bone laboras la vida percepto.

Redakcio de KOENMCANTO esperas, ke neniu proponos iun novan projekton de internacia lingvo, ekzemple EPSERANTO, ESREPANTO ktp...

Bill Thorne


(1921 — 2003)

Karaj legantoj! Kun granda malĝojo kaj bedaŭro ni devas informi vin, ke forpasis nia kara amiko kaj konstanta kontribuanto de "Komencanto", ŝatata de multaj el vi William Thorne.

Bill Thorne estis vera kaj fidela amiko de nia revuo ekde la unua kajero, iusence li estis eĉ baptopatro de "Komencanto".

Li estis ankaŭ aktiva membro de Londona E-klubo, ĉiam preta akcepti kaj helpi esperantistojn, ludi gitaron kaj klavaron dum E-kunsidoj en Londona klubo kaj liveri bonan humoron per siaj humuraĵoj, spritaĵoj kaj gajaj bildoj.

Bill estis bonkora kaj facilanima homo, li ĉiam restos viva en niaj animoj kaj ni daŭre aperigos lian "Rimaron", liajn bildojn kaj humuraĵojn, kiuj restis en nia rezervo. Li tre amis vivon kaj li vivos plu por ni en siaj verkoj. Iam al la redakcio estis senditaj de Bill rememoroj el lia vivo, kiujn nun ni publikigas ĉi tie.



la redakcio

Bill Thorne Bildoj de mia vivo

Mi naskiĝis en 1921, la 12-an de januaro. Mia patro estis eksa maristo, kiu post la unua mondmilito ne povis kutimiĝi al normala vivo hejme, do li foriris al Usono. En 1928 li iris al la Suda poluso kiel radiisto kun Usona ekspedicio. Kiam mi havis dek unu jarojn, mia patrino prezentis lin al mi en la strato, kiam mi revenis hejmen el lernejo. Poste ni loĝis kune kiel familio dum ses jaroj, ĝis li ordonis, ke mi vivu memstare.

Do, mi vivis sendepende. Pro la manko de familia influo, mi iĝis verve religia. Mi "volis" trafi al ĉielo, por esti kun Jesuo por ĉiam. Ŝajnis al mi, ke ju pli sankta mi estos, des pli mi proksimiĝos al "Dia Triopo".. Laŭ miaj malsufiĉaj eblecoj mi studis teologion kaj medicinon, por eble esti medicina misiisto. Samtempe mi laboris kiel tornisto en multaj etaj fabrikoj, kiuj iame abumdis trans Londono.

1939 jaro... Venis denove milito, kaj ĉar mi estis oficiale pacifisto, mi deĵoris kiel savanto dum la bombadoj de Londono. Ĉi tio elĵetis ĉiujn religiajn ideojn el mia eta juna kapo. Hornoj vere mortis ĉirkaŭ mi, la milito vere okazis, miaj preĝoj estis nur parolataj al mi mem. Do, mi demandis permeson por servi kiel maristo (simile kiel mia patro!). Mi miris, ke malgraŭ de la graveco de la milito, oni rajtis protesti kontraŭ ĝi. Kiel volontulo oni rajtis diri, kiun servon oni preferas. Oni rajtis diri, tamen mi devis iri en la armeon. Tie mi estis en speciala roto de pacifistoj, kiuj deĵoris kiel komizoj, aŭ faris fumekranojn (ni ege fidis fumekranojn tiam) aŭ servis en la stabo por militkaptitoj. Mi mem volontulis kiel medicina paraŝutisto. Mi jam legis multajn medicinajn librojn kaj jurnalojn kaj spertis sekuradon. Tamen la paraŝutadon mi ne tre ŝatis: mi ne estas heroo.

Mi edziĝis kun Kathleen. Ŝi estis bela Irlanda flegistino. Ŝajnas, ke ŝi ne ekzakte ŝatis min, sed pro la streĉeco de la milito, la bombado ktp, ŝi konsentis esti mia edzino. Mi estis for en la armeo, ŝi aliloke en malsanulejo. Iom poste ni decidis naski bebon, malgraŭ ke mankis al ni bona loĝejo, ni havis nur du ĉambrojn.

Post la milito mi revenis kaj laboris denove en fabriko. Ni kun Kathleen esperis, ke ni havos pli bonan loĝejon, kiel ĉiuj aliuloj, sed ĉar multaj domoj estis detruitaj pro la bombado, ni devis daŭre vivi en du malgrandaj ĉambroj. Baldaŭ aperis alia bebo. Ankaŭ aperis kvereloj inter ni. Mi donis al Kathleen mian tutan salajran paketon, kaj mi ekzistis dank'al mono, kiun mi gajnis, ludante gitaron en noktklubo dum dancoj kaj festoj.

Ni ne plu povis kunvivi kun la edzino, ĉar ŝi ekmalsanis skizofrenie. Mi daŭre vivis kun du miaj filinoj, kiuj fininte la edukon, trovis laboron, unu kiel instruistino, kaj la alia kiel sociologo, kaj edziniĝis. Nun ili estas plenkreskaj kun iliaj propraj plenkreskaj infanoj. Do, mi loĝis sole dum kvardek jaroj. Mi ne edziĝis denove, ĉar mi malsukcesis divorci post tri provoj.

Mi esperantistiĝis en 1976. Mi ŝatis interŝanĝi leterojn kaj gastigis multajn esperantistojn. Mi regule ĉeestis Londonan E-klubon, en la klubo mi ofte ludis gitaron kaj klavaron dum festoj, mi tradukis multajn kantojn. Eble ne ĉiuj tradukoj estas egale sukcesaj, sed ni devas provi krei, ĉu ne?

Bill Thorne

RIMARO

ETO

alfabeto
alumeto
amuleto
asketo
atleto
baleto
bileto
breto
buĝeto
debeto
dieta
dueto
enketo
gazeto
kabareto
kabineto
kabrioleteto
kadeto
kaseto
klarneto
kometo
kompleto
korneto
korseto
korveto
kreto
kriketo
kroketo
kvarteto
marioneto
menueto
minareto
musketo
omleto
parapeto
peto
pirueto
pleto
poeto
portreto
profeto
reto
rideto
sekreto
silueto
skeleto
spageto
stafeto
tabareto
tapeto
trumpeto
veto

Retrospektive el Bill Thorne

La kato

La kato sidis sur la aŭtomobilo.
 La hundo manĝis la kolbasojn.
 Mi perdis mian pantalonon.
 Mi serĉis ĝin en ĉiuj ĉambroj sensukcese.
 Ha, mi trovis pantalonon sub la lito.
 Sed kien malaperis miaj kolbasoj?
 Mi devis iri rapide al la laborejo.
 Kial ĉiuj kriegis al mi dum la vojaĝo?
 Ho, la kato alkroĉiĝis aŭtomobilon; timege.
 Ho, la kato tre timis, ĝiaj haroj staris rekte.
 Kiam mi karesis lin, ĝi trankviliĝis iomete.
 Mi portis ĝin en la oficejon.

Por ĝi mi aĉetis lakton el la trinkmaŝino.

Per la komputilo min atendis ordono de mia ĉefo
 — Ĉu vi povas rememori, kiam mi vizitis Usonon?

Mi demandis min silente: “Kial li mem ne povas
 memori lian viziton, ĉu ebris?”

Ne gravas: mi estas maljuna soldato — aŭdi estas
 obei.

Mi serĉis tra la listoj de la firmaaj kunsidoj dum
 lastaj tri jaroj. Mi serĉis tra la listo denove kaj
 denove, ankaŭ kontrolis la liston de vojaĝoj.

Dume la kato dormetis apude, kaj nun ĝi vekigis.

Ĝi venis al mi tra la skribotablo ronronanta. Ĝi
 volis manĝi. Ĝia piedo frapis la angulan klavon de
 mia komputila klavaro.

Samtempe mi tuŝis aliajn klavojn, mi ne sciis
 kiujn.

Subite sur la ekrano aperis sekreta konfidenca
 dokumento!

Estis listo de la ferioj de la direktoroj! Ankaŭ ĝiaj
 kostoj. Kaj jen estas la datoj, kiujn mi serĉis.

Do mi tuj presigis la tutan liston por mi mem kaj
 kaŝis ĝin.

Triumfe, mi sendis al la estro nur la datojn kiujn li
 volis scii. Dank'al la kato mi nun povus ĉantaĝi la
 tutan stabon. Ha-hal

Faciligo

Kia teda tasko estas skribi leterojn! Nun ekzistas FACILIGO! Nur notu kie taŭgas

Kara:

s-ro karulo patrino Reĝa Moŝto

Mi tre dankas vin pro via:

letero poŝtkarto konsilo bankĉeko

Mi ĝojas, ĉar vi estas:

bonstata ekster la malliberejo denove en malliberejo

Kial vi ne:

venĝu vin edziĝu kun mi iru al kuracisto

Ĉu vere, ke vi estas:

frenzata graveda ege riĉa bankrota

Mi intencas:

serĉi skribilon voki fajrobrigadon surmeti pantalonon

Ne forgesu:

survesti pantalonon sendi al mi monon

Informu min:

se vi ricevis ĉi tiun leteron kiam vi mortos

Lastatempaj novaĵoj:

hundo formanĝis vian leteron domrabisto formanĝis
 malfreŝan kol-bason, kiun mi forgesis forĵeti, li malsaniĝos
 certe. Bone, ĉu ne?

Multajn bondezirojn:

Ĝis reskribo Estu riĉa

Sincere via:

malnova amiko nova amiko




“ĈU VI PAROLAS ESPERANTE?
 JES, SED MI NE KOMPRENAS
 ĜIN.”

Vere granda viro nek distretas vermon, nek rampas antaŭ imperiestro.

Benjamin
Franklin,

AFORISMOJ



Kirjeeva Olga
[Medveje, Rusio]

Zujeva Margarita
[Moskvo, Rusio]

Perfidas nur siaj...
franca proverbo

Kiam oni devas
fari 10 paŝojn, sed
9 jam estas faritaj,
oni povas diri, ke
vi estas sur
duonvojo.

ĉina proverbo

En ŝtonojn pafi -
nur sagojn perdi
popola proverbo

Se vi ne scipovas
uzi la feliĉon, kiam
ĝi mem flosas al
vi, ne ĉagrenu,
kiam ĝi traflosos
preter

Servantes

La saĝa salutas la
unua

ĉina proverbo

Ei Germana gazetaro kolektis kaj esperantigis **Cezar** [Altenburg, Germanio]

Tiom longe, kiom oni ne povas mortbati muŝon per televidilo, ĝi ne povas anstataŭi la gazeton.

Manfred Rommel,
germana politikisto, nask 1928

La viroj sendube estas pli stultaj ol la virinoj. Aŭ oni jam iam aŭdis, ke virino edziniĝis pro la belaj gamboj?

Micheline Presle,
franca aktorino nask 1922

La muziko ĉe nuptofesto memorigas al mi ĉiam pri soldatoj, kiuj marŝas en la militon.

Heinrich Heine
germana poeto kaj verkisto, 1797-1856

La unua kondiĉo de la senmorteco estas la morto.

Stanislaw Jerzy Lec pola satirikisto, 1909-1966

La kredo pri pli bona futuro estas la plej potenca malamiko de la nuna libero.

Aldous Huxley, brita verkisto 1894-1963

Boguslaw Sobol
[Miłanówek, Pollando]

Originale verkitaĵ Epigramoj

Ne ĉiu vizaĝo
montras la saĝon.

Por li la idolo
estas alkoholo.

Kial fiŝo ploras?
Akvo fiodoras.

Li estas matura.
Kial ne kultura?

Truoj en kulturo
videblaj sur muro.

Onklo sur alta fotelo
veturigis lin al celo.

Kandidatojn li ne konas
sed unua voĉon donas.

Sen partio
li nenio.

De kiam li fariĝis estro
false ludas la orkestro.

Ŝi tre pia estas
nur se hejme restas.

Laŭ lia opinio
li estas tuj post Dio.

De kiam fariĝis
li superulo
tute forgesis
pri proksimulo.

Ĉiam atente
aŭskultas predikojn,
sed bedaurinde ne
amas amikojn.

Ĉiam lia festo
finiĝas per aresto.

Li anĝelo estas
kiam festas.

Supren levas
li ĉiam kapon
volas esti pli saĝa
ol papo.



Sendis Viktor Konevskij,
Esperantigis Semjon Vajnblat
[Odeso, Ukrainio]

El libro "Odesaj kantoj kaj anekdotoj",
Odesa urba esperanto-klubo
"BLANKA AKACIO"
Ridu kun ni!

- Mi revas veturi al Parizo, interese,
kiom kostas la bileto?
- Revoj neniom kostas.

- Bonvolu diri, ĉu vi ne rimarkis ie
proksime policanon?
- Ne.
- Tiam demetu la palton.

- Hieraŭ oni volis bati min.
- De kiu vi eksciis pri tio?
- Ĉar oni batis min.
- Kial do vi diris, ke oni volis bati vin?
- Ho, se oni ne volus, oni ne batus.

- Vi petis min elŝovi langon, sed dum
15 minutoj eĉ ne rigardis en mian
flankon.
- Mi deziris trankvile tralegi la historion
de via malsano.

- Estas hundoj pli saĝaj ol iliaj mastroj.
- Vi diras veron. Mi mem havis tian
hundon.

- Mi devas havi garantion, ke vi
fordonos al mi milionon post unu
semajno.
- Mi donas al vi vorton de honesta
homo.
- Bone, vespere mi atendas vin kun tiu
homo.

- Saluton! Kiom da vintroj, kiom da
someroj mi ne vidis vin! Ĉu trinku ni
po glaso?
- Kial do ne?
- Se ne - do ne!

- Ĉu vi denove revenis el restoracio?
- Ĉu vi dezirus, ke mi tie noktumu?

- Kelnero, al mi ŝajnas, ke ĉi-fiŝo ne
estas tiel freŝa kiel estis la antaŭhieraa.
- Vi ne pravas, ĝi estas la sama fiŝo.
- Bonvolu voki direktoron de via
restoracio, ĉar mi ne manĝos tiun
kotleton!
- Ankaŭ li ne manĝos ĝin.

Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]

- Kiel vi endormiĝas?
- Kiel? Mi kalkulas ĝis 3 kaj ekdormas.
- Ĉu efektive ĝis 3?
- Nu, foje ĝis 4.

- Kien vi preferus trafi, ĉu en paradizon
aŭ en inferon?
- Malfacilas decidi. El vidpunkto de
klimato, paradizo estas preferinda, sed
en infero la kompanio estos pli interesa.

- Kara mia, mi devas konfesi, ke mi
scias kuiru nur tortojn kaj fiŝojn.
- Ne gravas. Nur diru: tio ĉi estas torto
aŭ fiŝo?

Grigorij Arosjev [Moskvo, Rusio]

Kiel vi povas klarigi vian sorton per blato.

Kaptu blaton en la kuirejo, kaj atente rigardu ĝin

Se la blato estas vigla kaj sana - en via hejmo ĉio estas bone.

Se la blato estas malvigla - parolu kun via edzino, ŝi malbone manĝigas vin.

Se la blato estas nigra - baldaŭ vi havos novan, pli bonan postenon.

Se la blato estas rufa - blondulin' enamiĝis al vi.

Se la blato estas verda - a) baldaŭ vi havos multan monon, b) baldaŭ vi
partoprenos E-kongreson.

Se la blato konstante movas antenojn - vi estas homo energia, moviĝema, vi ne
povas longe nenionfaradi.

Se la blato staras senmove - vi estas filozofo.

Se la blato havas surprizitan aspekton - viaj ĉirkaŭuloj malbone aprezas vin.

Se la blato estas timigita - vi estas insistema kaj persistema homo.

Se la blato estas hele blua, havas kornojn kaj parolas homvoĉe - mi gratulas
vin, vi havas skizofrenion.



Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]

Kaptu blaton en la kuirejo

Karaj legantoj!

Jen vica "bongusa" kontribuo el Germanio de
Dorothea Kaiser

Karpo blua

por du personoj

Eventuale por Kristnasko kaj Silvestro

Ingrediencoj:

Karpo sen internajoj (inter 1kg kaj 1,5kg) * multe da salo * 1/8 lit. da bolanta vinagro * 1 cepo * pecetoj de radiklegomo el celerio, 1-2 karotoj * 2 brasikrapoj * 1-2 poreo * fasko da petroselo * 1/4 lit. da dolĉa kremo * 2 supkuleroj da kreno * 1 kulereto da citronosuko * 1 kulereto da sukero * 1 laŭrofolio * 4 pimentgrajnoj

Preparoj:

1. Purigu la karpon, sed ne senskvamigu ĝin! Enfrotu ĝin interne per salo.
2. Metu la karpon en platan ujon, verŝu sur la kuŝantan karpon bolantan vinagron.
3. Lasu tiel kuŝi la karpon dek minutojn. Ĝi tiam bluiĝas.
4. Plenigu en grandan paton tiom da akvo, por ke la enmetota karmo povos kovriĝi per ĝi. Aldonu la pecetojn da radiklegomo, tutan cepon kaj multe da salo (tiom da, ke vi devas elsputi ĝin post gustumprovo). Ĉion tion kuiru dekkvin minutojn.
5. Nun enmetu la bluiĝintan karpon kaj kuiretu ĝin sur flameto, ĉirkaŭ 45 minutojn.
6. Elprenu la fiŝon memgarde, por ke ĝi ne disfalu kaj metu ĝin sur pladon.
7. Por fajnigo de la karpogusto miksu la dolĉan kremon kaj la krenon en pelvo, spicu per iom da citronosuko kaj sukero. (Sufiĉus ankaŭ simpla varmega butersaŭco.)
8. Preparu kiel aldonajo la terpomojn kun legomoj kaj ruĝan brasikon laŭ via plaĉo.

Konsilo: Ĉar fiŝo devas naĝi, ne forgesu la blankan vinon! *Nepre elprovu foje tiun recepton, kiu estas frukto el multaj provoj! Via Donjo.*



Viktor Kudrjavcev kaj Sergej Ĉikaĉev en Ekaterinburg

Sergej Ĉikaĉev [Magadan, Rusio]

Ĉirkaŭ la mondo

Sergej Ĉikaĉev estas esperantisto-petveturanto, kiu planas dum du jaroj petveturi ĉirkaŭ la mondo. Li startis el sia gepatra urbo Magadan, kiu situas en Fora Oriento de Rusio, ĉe bordo de Oĥotskoje maro, la 5-an de aŭgusto 2003.

Sergej konatiĝis kun Esperanto en 1996. Samjare li konatiĝis kun la ŝatantoj vojaĝi pet-veture (ruslingva termino -- aŭto-stop) kaj fariĝis granda entuziasto de tiaspeca turismo. Li travojaĝis pet-veture la tutan Rusion kaj eksSovetion kaj nun li efektivas sian planon "Pet-veture ĉirkaŭ la mondo per Esperanto".

Sergej laŭvoje gastis en la apartamento de KOMENCANTO kaj rakontis por niaj legantoj pri siaj spertoj kaj planoj.

Postkiam mi sufiĉe spertiĝis kiel profesia petveturanto kaj traveturis Rusion mi ekkuraĝis ĉirkaŭveturi la tutan mondon. Sed ne sufiĉas sola kuraĝo. Oni devas tre serioze prepariĝi. Kaj certe mia revo povus efektiviĝi nur dank'al Esperanto kaj *Pasporta Servo*. Ekde 1999 mi komencis preparadon, dum kiu mi kontaktis plurajn dekojn da esperantistoj el *Pasporta Servo* kaj *Delegita Reto* en multaj landoj. Mi interkonsentis ne nur pri tio, ke oni min renkontos kaj helpos tranoki. Afrikan esperantistoj promesis organizi por mi loĝadon en tute sovaĝa tribo en ĝangalo, kaj la brazilaj — boatadon laŭ la tuta Amazono...

La 5-an de aŭgusto mi startis el Magadano kaj hodiaŭ post mia dorso restis jam pli ol 9000(!) kilometroj (de Magadan ĝis Ekaterinburg). Laŭ la vojo tra Nordo de Fora Oriento kaj Siberio min frontis tre multaj aventuroj. Ekzemple, en Jakutio mi atendis samdirektan aŭton dum 6 diurnoj(!) ĉe la vojrandoj. Mi fotiĝis apud la monumento ĉe la geografia punkto, tiel nomata "Poluso de Frosto" kie oni registris la plej minusan temperaturon sur la tero — 72 gradoj de C! Mi petveturis tra la sovaĝa tundro kaj senasfaltaj vojoj, mi vidis multon interesan kaj konatiĝis kun multaj interesaj homoj. Kaj al ĉiu mia kunvojaĝanto mi certe rakontis pri Esperanto.

Nun mi celas Moskvon por aranĝi vizojn en kelkajn landojn, kaj el Moskvo mi veturos suden tra Ukrainio Kartvelio, Turkio al Irako, Irano, Pakistano, Afganio, Hindio. De Hindostano mi planas pet-navigi (*hidro-stop!*) al Afriko, poste suden ĝis Sud-Afrika Respubliko.

El Suda Afriko mi planas pet-navigi tra Atlantika Oceano, atingi Argentinon, poste veni al Brazilo, kie estos planata boatado laŭ Amazonio. Poste min atendas Centra Ameriko, Kubo, Usono, Kanado kaj fine - el Alasko reen al Magadano. La tuta vojaĝo estas planita por 2 jaroj.

Mi venas al tute nekonataj homoj estante certa, ke ili min akceptos. Mia pago pro ĉio estas interesaj rakontoj pri miaj aventuroj, kiujn homoj admire aŭskultas kaj emas tute nature helpi al vojaĝanto. La tuta kunmia havaĵo konsistas el uniformo de pet-veturanto, dorsosako, tendo, dormosako kaj portebla gasforno.

Oni povas demandi - kio puŝas homon al tiom danĝera aventuro? Mi respondas - intereso al la vivo. Mi ŝatas vidi kaj kompreni vivon de ordinaraj homoj senpere, ne el la fenestroj de luksaj hoteloj kaj tra busaj vitroj. Mi volas vidi lokojn, kiuj restis tre malmultaj sur nia tero kaj kien dume ne venis "civilizacio" kun ĉiuj siaj "avantaĝoj". Nia lingvo Esperanto estas la plej bona rimedo vidi la mondon! Kaj pri danĝero de la vojaĝo - ĉu vivo en la modernaj urboj kun nervostreĉoj kaj malbona ekologio ne estas pli danĝera? Kaj mi tra la tuta vojo kontaktos nur kun bonkoraj homoj kaj ricevos el tio nur pozitivajn emociojn!

La redakcio de "K" deziras al Sergej felician vojon! Siaflanke Sergej Ĉikaĉev promesis informi legantojn de KOMENCANTO pri ĉiuj etapoj de sia ĉirkaŭmonda petveturado per Esperanto. Do, se vi volas legi pri ĉirkaŭmonda petveturado de Sergej Ĉikaĉev — abonu KOMENCANTO-n por la sekva 2004 jaro!

89 Universala Kongreso de Esperanto

Pekino (Ĉinio) 24-31 julio 2004

Ĉinio kun historio de 5000 jaroj estas unu el la kvar plej antikvaj civilizitaj landoj de la mondo. Ĝiaj 29 vidindaĵoj, kiaj la Granda Muro, la Imperiestra Palaco de Pekino, la Terakotaj Militistoj kaj Ĉevaloj ĉe la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, la Grotaroj de Mogao en Dunhuang, Potala-palaco de Tibeto, la antikva urbeto Lijiang kaj la klasikaj ĝardenoj de Suzhou estis enlistigitaj de Unesko kiel mondaj kulturaj kaj naturaj heredaĵoj.

Ĉinio kun vasta teritorio havas multajn belajn montojn kaj riverojn, kaj ĝiaj plej famaj vidindaĵoj estas la Tri Gorĝoj de Yangzrivero, pejzaĝoj de Guilin, la Okcidenta Lago en Hangzhou k.a. La montoj Huangŝan kaj Taiŝan.

Ĉinio nombras 55 nacimallimultojn, preskaŭ ĉiuj kun propra lingvo kaj vivmaniero. Iliaj vivregionoj kun belaj pejzaĝoj kaj interesaj naciaj moroj altiras al si ĉiujare multajn en- kaj eksterlandajn turistojn. Por viziti tiujn lokojn oni lanĉis novajn itinerojn, kiaj vojaĝo laŭ la antikva Silka Vojo, vizito al famaj budhismaj montoj, vojaĝo al Tibeto kaj vizito al Ŝangri-la.

Vizitantoj al Ĉinio povas ne nur plezurigi sin per ĝiaj naturaj belaĵoj kaj percepti la ĉarmon de ĝia kulturo, sed ankaŭ propraokule vidi ĝian grandan ŝanĝigon kaj sperti la vivon de ĝia popolo. En la pasintaj pli ol 20 jaroj Ĉinio praktikis la politikon de reformado kaj pordomalfermo. Se vi duafoje venos al Ĉinio en 2004 por partopreni la 89-an UK, vi certe trovos la landon ege diferenca de tiu en 1986, kiam ĝi gastigis la 71-an UK.

Pekino, antikva kaj vivoplena urbo

Pekino estas ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko, kun 13 milionoj da loĝantoj.

Pekino fondiĝis antaŭ 3000 jaroj, kaj ĝi ekzistas jam 800-jarojn kiel ĉefurbo. La longa historio postlasis al ĝi multajn kulturajn restaĵojn. La Imperiestra Palaco, la Granda Muro, la Somera Palaco, la Ĉiela Altaro. Promenante en Pekino, vi raviĝos de la imponaj konstruaĵoj de la Imperiestra Palaco, kaj ankaŭ de la ĉinstilaj loĝdomoj de tiu orienta urbo.

Pekino estas ankaŭ moderna metropolo. Preparado por gastigi la 29-ajn Olimpikojn de 2008 certe plirapidigos ĝian paŝon por internaciigo.

Veninte al Ĉinio vi nepre devas ĝui ĉinajn pladojn. Tie estas ne nur tradicia fama plado rostita pekina anaso, sed ankaŭ bongustaj pladoj de aliaj lokoj de Ĉinio.

Kiam nokto falas, vi povas ĝui ĉinan teon en tetrinkejo kaj pekinan operon en teatro. Jam de dekoj da jaroj babili en tetrinkejo kaj spekti pekinan operon estas ĉefa maniero de amuziĝo de pekinaj loĝantoj.

Kongresejo

La 89-a UK okazos en la Internacia Konferenca Centro de Pekino, kiu situas en la Vilaĝo de Azia Sportkunveno en la norda parto de Pekino, 9 kilometrojn norde de Tian'anmen-placo en la urbocentro, 20 kilometrojn okcidente de la Ĉefurba Fluĝaveno kaj 12 kilometrojn oriente de la Somera Palaco.

La Internacia Konferenca Centro de Pekino estas facile atingebla per diversaj trafikiloj, la medio kvieta kaj komforta. Ĝi, moderne ekipita, kun hoteloj de diversaj kategorioj kaj amasloĝejoj, vendejoj kaj aliaj servejoj en la ĉirkauaĵo, estas tauga por diversaj grandaj kunvenoj kaj ekspozicioj.


Hoteloj

La regiono, en kiu situas la kongresejo, estis konstruita por gastigi la sportistojn dum la Azia Sportkunveno en 1990 kaj ĝi verŝajne servos ankaŭ por la Olimpikoj en 2008. Tial abundas tie hoteloj kaj loĝejoj de ĉiuj niveloj je vera promendistanco, fakte tute ne necesos busoj au aliaj trafikiloj, krom se vi preferos loĝi en la urbocentro.

Ekskursoj

Se temas pri la ekskursoj, la kongresanoj havos nur unu problemon: kiun elekti. Krom pluraj allogaj vizitoj en Pekino mem kaj ĝia ĉirkauaĵo, estos aranĝitaj ankaŭ multaj ravaj ekskursoj al famaj naturaj kaj historiaj vidindaĵoj ekster Pekino.

Ĉinio multe ŝanĝiĝis post la gastigo de la 71-a UK en 1986. Venu percepti ĝian progreson kaj admiri refoje tiun ĉi antikvan kaj fascinan civilizon.



Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

31 ja., serĉas korespondamikojn tutmonde por plibonigi sian E-on, paperpoŝte.

Jakovleva Elena
Partizanskaja, 51-1-196
Arhangelsk,
163059
Rusio

Mi estas 53 jara fraŭlo, komencanto. Intereso: problemoj de patrinoj de junuloj kaj infanoj; folkmuziko (mi kantas kaj ludas gitaron, pianon, kaj Irlandan folkharpon).

Roberto F. Burns
630 Nylon Boulevard
Seaford,
Delaware 19973

Usono

RBurns630@aol.com

Mi estas fraŭlo 22 jara, komencanto. Intereso: rok-muziko, matematiko. Mi deziras paperpoŝton.

Michiel BORKENT
Geraniumstraat 48
7531 ZW Enschede

Nederlando.

borkent@cs.utwente.nl

Mi estas 36-jara kaj skribas el malgranda pola urbo Elk. Se iu volus interŝanĝi opiniojn kun mi pri diversaj temoj - mi senpacience atendas leterojn. Mi povas skribi papere aŭ rete.

Barbara Kruszevska
Woj. Polskiego 62a/9
PL 19-300 ELK,

Pollando

basiak67@op.pl

Gundt Andrej [T]joploje, Rusio



KOMENCANTO

restas revuo por vi.

Ne forgesu
reaboni ĝin
por 2004!

Mi estas 34 jara, komencanto. Interesiĝas pri literaturo, ekologio, homaj rajtoj, memkonado.

Luis Paulo Martins Nogueira
R. Miguel Odia Fagundes 86, casa 01
Bairro Fazendinha
Curitiba - PR - CURITIBA
CEP 81320 - 150

Brazilo

Grupo de leantoj el la 6-a, 7-a kaj 8-a klasoj de la baz-lemejo infanoj inter 11 kaj 14 ja., lemas E-ton. Ili deziras korespondi papere.

Scuola Media Statale
"Francesco Petrarca"
Insegnante Angelo Scalia
Via Amulio, 4
IT-00181 Roma

Italio

Kontaktoj kun esperantistoj tra la tuta mondo serĉas 57 jara esperantisto, kolektanto de telefonkartoj por ties interŝanĝo.

Vladimir PYS
ul. Trachovec 3013
OSTRAVA - Martinov
ČR — 723 00
Ĉeĥio

Mi estas komencanto, 54-jara viro, malliberulo. Int.: amikeco, legado, lingvoj, ŝakludo.

Ron Hinkley
#20882
Utah State Prison
P.O.Box 520
Draper, UT 84020

Usono

Prlingva instruisto dez. kor. cele amikiĝi kaj interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn.

Bull Xulidis
Klathmonos 3,
Thessaloniki, GR-546 34

Grekio

Mi estas 16-jara knabino, mi ŝatas legi, desegni, muzikon kaj volas korespondi kun samaĝaj knabinoj.

Izabella Ciobanu
537240 Praid
str. Gorgenyalja 899
Jud. Harghita
Rumanio

komencanto@r66.ru
<http://Esperanto.net/Komencanto>
viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

